

BONA VOLO

La Revuo de la Ekumena Spiritualeco • JARO 21 • N-ro 62



LBV kaj Esperanto

- Brazila Kongreso kunvenigis esperantistojn en Rio-de-Janeiro
- Legio de Bona Volo partoprenis en evento kaj lanĉis publikigaĵojn en la idiomo

Meditado de BONA VOLO:



José de Paiva Netto, ĵurnalisto, radiokronikisto kaj verkisto. Li estas Prezidanto de la Institucioj de Bona Volo.

En estonteco kiun ni, civiluloj, religiuloj kaj militistoj kun komuna saĝo, deziras proksima, Paco ne plu firmiĝos sub la turniĝantaj raŭpoj de tankoj aŭ ĉe la tondrado de kanonoj; super granda kvanto da kadavroj aŭ amasoj da vidvinoj kaj orfoj; eĉ nek super grandiozaj faritaĵoj de materia progreso sen Dio. Tio estas, sen la responda etika, morala kaj spiritala antaŭeniro. La Homo malkovros ke li ne estas nur sekso kaj stomako. Estas en li la eterna Spiri-

to, kiu parolas al li pri aliaj vivoj kaj aliaj mondoj, kiujn li serĉas per Intuicio aŭ per Racio. La paco de la homoj estas ĝis nun la paco de la lupoj kaj de kelkaj ne antaŭzorgemaj frenezuloj kiuj gvidas popolojn sur la Tero.

Paco, la vera Paco, naskiĝas unue el la koro pura de la Homo. Kaj nur Jesuo povas purigi la koron de la Homaro je ĉia malamo, ĉar Jesuo estas la Sinjoro de Paco.

(Eltiraĵo de *Meditadoj kaj Pensoj – Dialektiko de Bona Volo*, de Paiva Netto, lanĉita en 1987, 51-a eldono, paĝo 113.)



E L E V A Ç Ã O

JARO 21 • N-ro 62

BONA VOLO

BONA VOLO estas kvarmonata publikigaĵo de IBVJ, eldonita de Eldonejo Elevação. Ĝi estas registrita per n-ro 18166, la 16-an/3/2006, sur la libro "B" de la 9-a Notario pri Registro de Biloj kaj Dokumentoj de San-Paŭlo, Brazilo.

Direktoro kaj ĉefeldonisto:

Francisco Periotto MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

Ĝenerala Kunordiganto:

Gerdeilson Botelho

Skipo de Eldonejo Elevação:

Adriane Schirmer, Daniel Trevisan, Felipe Duarte, Jéssica Botelho, Leila Marco, Maria Aparecida da Silva, Letícia Rio, Neuza Alves, Raquel Bertolin, Rodrigo Oliveira, Rosana Bertolin, Natália Lombardi, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri.

Kovrilo kaj Grafika Projekto:

Helen Winkler

Foto de la Kovrilo:

André Fernandes

Kompostado:

Helen Winkler kaj Felipe Tonin

Presado:

Mundial Artes Gráficas

Ĉiuj rajtoj de tiu ĉi eldono rezervitaj de Editora Elevação

Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo
CEP 01134-050


Tel.: (+55 11) 3358-6868/ Fax: (+55 11) 3358-6882

www.bonavolo.com



6

Speciala
LBV kaj Esperanto



4

El la arkivoj de BONA VOLO
Japanio-Brazilo: La Enmigrado estiĝis per traktato pri amikeco



14

Okazaĵo
Bieno-Lernejo Bona Espero akceptas Legion de Bona Volo



15

Novaĵo el Brazilja
La Ĵurnalisto Roman Dobrzyński lanĉas libron en la Artgalerio de TBV



Aliru:
www.bonavolo.com

Esperantistoj de la tuta mondo skribas al LBV

Sincere impresis min ĉi tiu nekonata ĝis ĉi tiu momento vere grandegan moralan kaj kulturen paĝojn, enhave. **(Agim Peraj, Albanio)**

Pri Legio de Bona Volo mi konatiĝis dum 72a UK-o en Varsovio en 1987 j. kaj poste leginte *Meditadojn kaj Pensojn* de Paiva Netto kies filozofia, religia, morala kaj universala manifesto profunde impresas kaj pensigas ĉiun intelektulon. **(Antonio Jerzy Walaszek, Pollando)**

Mi alte aprezas la agadon de LBV, tre estiminda Organizaĵo pri kiu mi scias delongege. **(Boris Kolker, Usono)**

Mi feliĉas scii ke vi bone agas por unuigi la Homaron ekumene. Mi mem estas pentekosta kristano kiu toleras ĉiuj kredojn kiuj celas al unuigo de Homaro, ne flankenmetanta la plej necesaj elementoj: amo, paco kaj unueco. **(Gabrielo O. Oshó-Davies, Niĝerio)**

Ke ĉiuj bonvolaj homoj povu esti unuigitaj en la celo plibonigi nian mondon. **(Inés A. Beaumont, Argentino)**

Mi legis kun granda intereson pri leteron (informo-letero pri LBV) kaj tuje mi vizitis la retpaĝon. Admirinda estas la ideo de Legio de Bona Volo (LBV). Kiel membro de IKUE kies landa reprezentanto mi estas en Kongo, la ideo pri ekumenismo jam delonge kaptas mian atenton. (...) Mi legis eĉ la francan version, sincere tiomulte kaptis min. **(Jean Bosco Malanda, Kongo)**

Legio de Bona volo estas tre interesa kaj bezonata agadsfero! Mi deziras al vi Dian benon kaj favoron, bonan sanon kaj sufiĉe da tempo por fari bonon. **(Jiří Laůbe, Ĉeĥio)**

Jesuo diris se du au tri personoj unuigas Dio estas tie. Mi kredas Dio estas kun vi ĉar vi jam fariĝis granda familio. **(Matabaro Minani, Tanzanio)**

“(…) La agado de LBV multe kontribuas en la kampoj eduka, kultura, amaskomunika kaj religia (precipe interreligia), ne nur enlande, sed ankaŭ eksterlande. Kaj nuntempe ĝi estas unu el la plej grandaj neregistaraj organizoj. LBV konsideras grava la principon de Ekumenismo: ĝi akceptas ĉiujn organizojn, ekzemple, katolikan, spiritisman, umbandan, ŝintoisman, budhisman k.a. sendepende de iliaj doktrinoj kaj sektoj. Krome, samtempe kun sia fondiĝo, LBV

enkondukis la internacian lingvon Esperanto kaj kontribuas por la Esperanta movado. **(Ŝigeki Maeda, Japanio)**

Niaj dankoj al ĉiuj samideanoj, kiuj kontaktigis la Departementon pri Esperanto de Legio de Bona Volo:

Argentino – Ruben T. Diaconu; **Benino** – François Hounsou; **Brazilo** – Carlos Maria, Fabiano Henrique, José Sarai-va Matos, Josias A. Andrade kaj Maria Cleonice; **Bulgario** – Genĉo Colov Cokanov; **Ĉeĥio** – Olga Glendová; **Ĉinio** – Wang Ruixiang; **Finnlando** – Sigrid Kivistö; **Germanio** – Alicja Lewanderska-Quednau kaj Martin Schäffer; **Hispanio** – Lorenzo Noguero; **Hungario** – Árpád Máthé kaj Simaga Saba; **Islando** – Jón Hafsteinn Jónsson; **Italio** – Nicola Morandi kaj Renato Corsetti; **Japanio** – Atusi Nisinaga, Hori Yasuo kaj Yamamoto Sinarô; **Kanado** – Raymond Brisebois; **Komoroj** – Ali Mze Mihidjahi; **Kongo** – Roger Mambuene; **Korea Respubliko** – Lee Chong-Yeong; **Latvio** – Māra Timermane; **Nederlando** – Universala Esperanto-Asocio; **Nikaragvo** – José Dolores Gaitán Moreno; **Pakistano** – Jawaid Eahsan; **Peruo** – Carlos A. Miranda; **Pollando** – Roman Dobrzyński; **Slovakio** – Martin Minich; **Svedio** – Arne Lundkvist; **Ukrainio** – Ĵenja Zvereva; **Usono** – Rubén Feldman-González.

Sendu ankaŭ Vi mesaĝon al LBV:

esperanto@bonavolo.com

La enmigrado estiĝis per traktato pri amikeco



La Princo Fumihito akompane de la tiama Prezidento José Sarney ĉe la celebrado en Pacaembu. Ankaŭ la tiama japana Ĉefministro, Noburo Takeshita, honorigis la eventon per sia ĉeesto. En la okazo LBV direktis al la japanaj gefratoj la ĉefartikolon de sia Direktoro-Prezidanto, Paiva Netto, nomatan *Okjardekoj ankaŭ en konstruado de Brazilo*.

Proksime kiam oni memorfestis la centjariĝon de la japana enmigrado al Brazilo (junio 2008), la revuo BONA VOLO komencas omaĝi kaj salutas tiujn gefratojn, kiuj antaŭ preskaŭ 100 jaroj alvenis ĉi tie kaj, de tiam, helpas konstrui la brazilan historion. Tiuj ligiloj, kiuj kunigas la du landojn, komencis proksimiĝi en 1895, per la subskribo de la traktato pri Amikeco, Komerco kaj Navigado, per kiu estiĝis la kontrakto pri enmigrado en 1907. Tiu ĉi interkonsento venigis al nia lando, en la sekva jaro, 781 japanojn por labori kiel terkulturistoj. Tiuepoke la japana popolo jam maltrankviliĝis pri la kresko de la loĝantaro kaj suferis pro manko

de krudmaterialo sekve de bojkoto de potencaj nacioj kiuj timis ĝian konkurencon. Brazilo siavice bezonis terkulturistojn.

Post 99 jaroj ekde la alveno de la ŝipo Kasato Maru en la urbon Santos, la rilato inter ambaŭ popoloj pli proksimiĝis. Ia grava momento estis la celebrado, en 1988, pri la 80-jariĝo de la japana enmigrado. En tiu jaro la celebrado atingis sian plej elstaran punkton en la 18-a de junio — dato de la alveno de la unua grupo de pioniroj en Brazilon — per granda festo en la stadiono Pacaembu, en San-Paŭlo. Partoprenis la eventon la tiama Prezidento de Brazilo, **José Sarney**, kaj la Princo **Fumihito**, speciale veninta el la Tero

de la Naskiĝanta Suno, krom aliaj personuloj.

En la okazo la ĵurnalisto kaj verkisto Paiva Netto laŭdis la strebojn de la japana komunumo en la konstruado de la brazila nacio, reliefigante, ke sen tiu kontribuo Brazilo “*estus alia lando iom malpli granda*”. La speciala homaĝo farita de la Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo, *Okjardekoj ankaŭ en konstruado de Brazilo*, estis portugale publikigita kiel ĉefartikolo en la junia numero de la revuo BONA VOLO, de tiu jaro. La Institucio reprezentigis en la evento per tiu ĉi gratulmesaĝo de Paiva Netto direktita al la japanaj gefratoj:

“(…) *Mardistanco venkita. Kulturoj, etnaj kaj religiaj baroj, suferoj kaj elreviĝoj... ankoraŭ superotaj... Kaj tio jam okazas iom post iom: venko super humileco, ĉar humileco devas esti kuraĝa; super Aganta Fido, ĉar Fido ne povas esti tiu senfara — ĝi ja estas la ĉiutaga nutraĵo de la Spirito —, tiu egoisma, tiu de nuleco. Venko de obstineco, ĉar decidema popolo kapablas vidi la obstaklojn kiel stimulojn al prospero. Tre oportuna estas tiu ĉi instruo el la orienta saĝeco: ‘En la koro de la homo vivas praa forto je reciproka harmonio, estigita de la Ĉielo kaj Tero. Ĝi estas la origina fonto de la homa vivo’.*

“*Sen ĝia kunlaborado tiu ĉi lando, kiu apartenas al ĉiuj, estus alia iom malpli granda... Laboro*



La tiama prezidanto de Bunkyo, Masuichi Omi (dekstre), vizitas la ĉambrojn de Supervartejo Jesuo akompane de Ryoichi Kodaman, la 21-an de julio 1988.



Tuj post la alveno, la japanaj vizitantoj estis omaĝitaj de la infanoj el la Ekumena Infana Koruso de LBV.

*prosperigas. Kaj la miljara japana popolo kaj ĝiaj posteuloj laboradas. 'Samkiel arboj kaj herboj senĉese kreskas — instruadis **Kaibara Ekken** — ekzistas en nia koro ia senhalta kaj neretenebla povo, kiu sin nutradas el la misteroj de la naturo kaj estigas trankvilecon kaj harmonion ene de ni. Ĝin ni nomas la ĝojo bone vivi. Krom esenca sidejo de la koro, ĝi estas la fundamento de tiu virto nomata homaro'.*

"(...) Ankaŭ la junaj legianoj de

En la vartejoj de la Intitucio infanoj kunvivas fratece kaj harmonie, sendepende de raso, religio aŭ haŭtkoloro.



Bona Volo kredas je la miraklo de laboro. Ili scias, ke pere de ĝi ĉiaj sukcesoj estas atingeblaj.

"Komence de tiu ĉi jardeko (1980) en Santo André, San-Paŭlo, mi min direktis al ili per tiuj ĉi vortoj: Ĝuste en tiuj krizaj momentoj formiĝas la noblaj virtoj kaj estiĝas la plej potencaj nacioj. Japanio estas tia ekzemplo: ĝi estas izola lando konsistanta el kelkaj insuloj. Ne havas petrolon. Importas la plej multon el la bezonaĵojn por pluivado (...). Vi vokas japanon kaj donas al li ŝtonarejon. Tie li produktas tomaton, papajon, citronon, fazeolon... Kial?! Ĉar la batalo por venki la termalvastecon de la insularo igis ilin superi la limigon kaj, superante la mankon de vaste produktivaj terpecoj, ili fariĝis nesupereblaj terkulturistoj. Tio sen mencio al la potenco de ilia industrio... Jen kial ni ne devas eviti malfacilaĵojn. Ni devas alfronti kaj aliigi ilin al grandaj venkoj.

*"(...) Niajn dankvortojn al la postgeneraciaj japanidoj (**issei, nissei, sansei, yonsei**) kiuj de jaroj amikece*

La tradukistino Marie Murakami, kunlaboranto de LBV, kun sia familio. Tradukinte la tekstojn de Paiva Netto al la japana, ŝi ĉiam asertis, ke ĝia mesaĝo pri Paco venigas trankvilsenton al la japanoj.



Reprodukto de la kovrilo de la revuo BONA VOLO (japane), speciala eldono, kiu memorfestis la 80 jarojn de la japana komunumo en Brazilo.



apogas la fratan kaj senlime ekumenan aktivadon de LBV. Banzai!

Laboro de LBV impresas la Japanan komunumon

La 23-an de julio 1988 la gazeto *São Paulo-Shimbun*, raportis pri la vizito de reprezentantoj de la brazila-japana komunumo al la lernejo subtenata de LBV en San-Paŭlo. La vizitantoj — **Masuichi Omi**, tiama prezidanto de la Brazila Societo pri Japana Kulturo (Bunkyo) kaj ankaŭ de la Organiza Komisiono por la celebrado omage al la 80-jariĝo de japana enmigrado en Brazilo; **Paulo Ishii**, tiama komisiito pri la japana sektoro ĉe la aviada kompanio Varig; **Ryoichi Kodama**, pluvivanto de Kasato Maru; kaj **Rosa Oikawa**, tiama vickunordigantino de la Muzeo pri Japana Enmigrado —, konis ĉiujn ĉambrojn de la Infanvartejo.

Oshiro Sanenari, el *São Paulo-Shimbun*, difinis la laboron disvolvitantan de LBV kiel "impresa".

La familio Tokuda: patrino, filoj, bofilinoj kaj nepoj
Legianoj de Bona Volo en San-Paŭlo.





LBV kaj Esperanto



Brazila Kongreso kunvenigis esperantistojn en Rio-de-Janeiro

Felipe Duarte kaj Simone Barreto

Fotoj: Cida Linares, Jéssica Botelho kaj Simone Barreto

Dum preskaŭ ses jardekoj da laborado, Legio de Bona Volo (LBV) bataladis favore al la disvastigado de Esperanto, efektivigante la statuson starigitan de la Fondinto de la Institucio, **Alziro Zarur** (1914-1979), kiu celas: *Batali por la plej granda disvastigado de la internacia lingvo Esperanto, altvalora ilo por la interfratiĝo de la popoloj, laŭ la konsidero, ke LBV estas la Esperanto de la religioj, samkiel Esperanto estas LBV de la lingvoj*". Estis pro tio, ke LBV starigis en siajn agadojn la idealon de la idiomo

kreita de la pola kuracisto kiu konis lingvojn, **Lazaro Ludoviko Zamenhof** (1859-1917), nome tiu, kiu starigas interkompreniĝon inter Popoloj.



L.L. Zamenhof

La Institucio, pere de sia Departemento pri Es-

peranto, plenumas diversajn esperantistajn aktivecojn, ricevas plurajn korespondaĵojn el la tuta mondo per sia Reta Paĝaro Bona Volo en Esperanto (www.bonavolo.com), kaj esperantigas siajn publikigaĵojn.

Solena malfermo de la 42-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Universitato de la Provinco Rio-de-Janeiro (UERJ). La evento pritemis la strategiojn por la estonto de la internacia idiomo inter la tagoj 8-a kaj 13-a de Julio 2007.





Publikigaĵoj de LBV portitaj al la 42-a Brazilia Kongreso de Esperanto

De la 8-a ĝis la 12-a de Julio, en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, LBV ĉeestis en la 42-a Brazilia Kongreso de Esperanto. La evento okazigis prelegojn pri deversaj temoj, lanĉojn de libroj, KD-ojn kaj DVD-ojn, ekspoziciojn pri manfaritaĵoj kaj literaturoj, teatron, kaj ankaŭ okazis la *Ekumena Rekontiĝo*, aranĝita de la plenum-komitato de la Kongreso, kun la temo Ekumenismo.

Tiuokaze Legio de Bona Volo lanĉis dum la Kongreso je sia budo plurajn publikigaĵojn en Esperanto: la revuo *Paco por la Jarmilo*, du infanaj libroj de la kolekto Fabeloj de la Naturo, de Eldonejo Elevação, nome *La mallaborema formiko* kaj *Ruĝa Fiŝeto*; kaj resumo de la mesaĝo *Ok Celoj por la Jarmilo*, verkita de Paiva Netto, kiu konsistas el la revuo *Tutmondigo de la Frata Amo*, kiu estis sendita al kunsido de *High-Level Segment 2007*, en *Palais des Nations*, ĉefa oficejo de UN en Ĝenevo (Svislando) kaj estis akceptita kun entuziasmo de Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Ban Ki-moon,

okaze de vizito al budo de LBV en evento. Sekretario alsubskribis lian apogon al LBV per signaturo sur kovrilo de revuo kaj konfirmis deziron de sukceso por ĉiuj agadoj plenumataj de Legio de Bona Volo.

Kune kun la 42-a Brazilia Kongreso de Esperanto okazis la 27-a Brazilia Esperantista Junulara Kongreso kaj la Infana Kongreseto, kies programo estis kreita por lude instrui kaj distri la infanojn de ĉiu aĝoj pere de amuzaĵoj, kulturaj aktivecoj kaj multaj pliaj aferoj.

Solena Malfermo de Kongreso

La solena malfermo de la Kongreso de Esperanto okazis je la 8-a de Julio, je la 6-a vespere en la Teatro de Universitato de la Ŝtato Rio-de-Ĵanejro (UERJ), en la urbo Rio-de-Ĵanejro. La celo de la Kongreso laŭ la Prezidanto de la Brazilia Esperanto-Ligo, D-ro **Pedro Jacintho Cavalheiro**, “*estas profunde meditati pri la ĉefa temo, t.e., pridiskuti strategiojn por la estonto. Tiu kiu parolas Esperanton travivas*

unikan sperton: interkomuniki kun homoj de la tuta mondo per ŝango de ideoj, emocioj, konoj kaj kulturo”.

Okaze de la evento, kiu kalkulis je partoprenantoj de Brazilo kaj eksterlandanoj, la Prezidanto de la Brazilia Esperanto-Ligo salutis al ĉiuj idealistoj de la internacia lingvo, kaj omaĝis la eksprezidantojn de la Ligo, kaj ankaŭ al tiuj, kiuj bone agadis favore al la esperantista movado en Brazilo. La Kongreso memorfestis ankaŭ la centjariĝon de kreo de la Brazilia Esperanto-Ligo.

Okaze de la momento, kiam li ricevis de la LBV-representantoj la revuon *Paco por la Jarmilo*, li substrekis: “*Mi gratulas LBV-on pro la agado farata de ĝi favore al infanoj, kaj ankaŭ pro tio, ke oni instruas Esperanton al ili. Vi plenumas eksterordinaran taskon, ĉar estas gravaj esploroj publikigitaj en universitatoj de Eŭropo, en sciencaj publikigaĵoj, kiuj pruvas ke Esperanto estas propedeŭtika lernobjekto, t.e., ĝi faciligas la lernadon de alilingvoj, ankaŭ de la patrina lingvo,*

“Mi gratulas LBV-on pro la agado farata de ĝi favore al infanoj, kaj ankaŭ pro tio, ke oni instruas Esperanton al ili. Vi plenumas eksterordinaran taskon. (...) Tiuj infanoj, kiuj lernas Esperanton, nuntempe ricevas ilon por konstrui rezonkapablon, kiu fariĝos tre utila. LBV donas tian oportunon. Pro tio mian brakumon al vi ĉiuj. Gratulon pro la iniciato. Vi vere vin distingas.”



D-ro Pedro Jacintho Cavalheiro
Prezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo

kaj eĉ helpas elvolvi la matematiklogikan rezonadon. Tiuj infanoj, kiuj lernas Esperanton, nuntempe ricevas ilon por konstrui rezonkapablon, kiu fariĝos tre utila. LBV donas tian oportunon. Pro tio mian brakumon al vi ĉiuj. Gratulon pro la iniciato. Vi vere vin distingas”, li finis.

Unu el tiuj, kiuj estis omaĝitaj en la Kongreso estis la profesoro **Jorge das Neves**, eksa Ĝenerala Delegito en Brazilo de la Universala Esperanto-Asocio. Tiuokaze li parolis pri la ricevita ordeno: “Ĉi tiun platon mi povas ankaŭ ĝui kun LBV, ĉar kiam mi estis 23-jaraĝa, mi estis invitita de la Fondinto de LBV, Alziro Zarur, por ke mi prezentu per Rádio Mundial [Monda Radio] (radistacio de Bona Volo en tiu tempo), programo titolita ‘Ni lernu Esperanton’, kiu vere preparis aron da esperantistoj, kiuj agadas ĝis nun. La programo atingis grandiozan aŭskultantaron laŭ statistiko.

Post kiel Ĝenerala Delegito de la Universala Esperanto-Asocio, mi estis



Luiz Alberto Martins

invitita de la ĵurnalisto Paiva Netto, labori en la Departamento pri Esperanto instruante la lingvon al la infanoj de la Institucio. Estis tre grava disvastigado, ne nur favore al Esperanto, sed por prezenti la Ekumenismon de Legio de Bona Volo praktikita per la idiomo. Mi gratulas la administradon de Paiva Netto, kiu estis mia kolego en la Kolegio Pedro II, pro la daŭrigo de tiu mirinda laboro, kaj ankaŭ pro la lanĉo de Paco por la Jarmilo, prezentante la gravecon de Esperanto, kaj kiel LBV sukcesas agadi per tiel bela maniero, tiel moderna, prezentante la praktikecon de la E-lingvo, ekumene parolante, por proksimigi la popolojn. Paroli pri Paco estas paroli pri Legio de Bona Volo, kiu havas filozofian aŭtoritatecon por paroli pri tio. Mi tre dankas”, aldonis li.

La esperantisto, sinjoro **Luiz Alberto Martins**, elstarigis la partoprenon de LBV en la evento. “Mi konas la agadon de LBV ekde la tempo de la karmemora Alziro Zarur. Ĝi estas tre bona! Ĉiu movado, kiu celas la



Infanoj de Instituto pri Edukado de LBV dum Esperanto-leciono kun la instruisto José Tenório.

interfratiĝon estas bonega kaj devas esti stimulata. LBV brakumante Esperanton marŝas sur ĝusta vojo, kiel ĝi agadis ĝis nun”.

La instruisto **José Roberto Tenório da Silva**, Direktoro de la Brazila Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEIBR), kiu ankaŭ instruas la idiomon en la Instituto pri Edukado José de Paiva Netto, en San-Paŭlo, esprimas sian kontentecon, ke li faras tian laboron en lernejo. “Mi dankinde havis la plezuron esti invitita por instrui Esperanton en la Instituto pri Edukado de LBV. Por mi estas granda defio kunlabori kun tiu granda Institucio. Mi povas diri, ke la infanoj lernas kun multe da dediĉo, kun



“Mi plezure kaj honore akceptas la reprezentatojn de LBV, kiu estas ia Instituto ege laŭdinda, kun idealoj tute kristanaj, kiuj evidente kongruas kun la idealoj de Esperanto, pri Frateco, Boneco, Amikeco kaj tiel plu. Mi elkore dankas pro la revuo (Paco por la Jarmilo).”

D-ro Geraldo Mattos

Prezidanto de la Internacia Akademio de Esperanto



multe da ĝojo kaj entuziasmo”, li konkludis.

D-ro **Geraldo Mattos**, Prezidanto de la Internacia Akademio de Esperanto emocie dankis la novan publikigaĵon de LBV, *Paco por la Jarmilo*: “Mi plezure kaj honore akceptas la reprezentatojn de LBV, kiu estas ia Instituto ege laŭdinda, kun idealoj tute kristanaj, kiuj evidente kongruas kun la idealoj de Esperanto, pri Frateco, Boneco, Amikeco kaj tiel plu. Mi elkore dankas pro la revuo (Paco por la Jarmilo). Diru al Paiva Netto, ke mia koro estas kun li kaj kun ĉiuj, kiuj kredas tion, kion predikas LBV”, konkludis li.

Fabiano Henrique de la *Radio Rio-de-Janeiro* kaj de la *Ĵurnalo Correio Espirita*, aŭdanto de la Supera RBV, vizitis la budon de LBV kaj elstarigis la Retan Paĝaron Bona Volo, kun la Ekumena mesaĝo de la Instituto. “Mian fratan saluton al ĉiuj amikoj de Legio de Bona Volo. (...) Tiu agado de Legio de Bona Volo estas laboro, kiun tie-ĉi publike mi emas aplaŭdi. Mi kaptas la okazon por sendi mian fratecan brakumon al la amikoj de LBV, de la Supera

Radio Brazilo (940AM) — stacio de la Supera Reto Bona Volo —, kiu markis la historion de la esperantista radielsendado en nia lando pere de programo de nia amiko Jorge das Neves, ĉe iama Stacio de Bona Volo. Do ĉiuj ni multe ŝuldas al Legio de Bona Volo pro tia iniciato”.

Interreligia Momento

Ene de la 42-a Brazila Kongreso de Esperanto, Legio de Bona Volo estis invitita por speciala partopreno ĉe la Religia Rekontiĝo, kiu okazis en lundo matene, la 9-an de Julio. Ĉiuj religiuloj kunsidis en la Zamenhof Salono por disvastigi ilian mesaĝon en Esperanto, kiel ia invito al Paco.

Tiuokaze, LBV estis reprezentita de esperantista Legianino kaj tradukisto de la Departemento pri Esperanto de LBV **Maria Aparecida da Silva**, kiu legis la artikolon “Dinamismo pri Paco”, verkita de la ĵurnalistino Paiva Netto. Maria Aparecida elstarigis, ke la artikolo prezentas al la mondo ian novan ideon pri Ekumenismo, tiu kiu emociiĝas pro doloro kaj laŭ Paiva Netto, ĝi estas “Edukado malferma al Paco”.

La juna esperantista Legiano **Felipe Duarte**, 16jara, legis pecojn de la mesaĝo “Ok Celoj por la Jarmilo” kaj la juna esperantista Legianino **Jéssica Botelho**, 15jara, legis la tekston “Ekumenismo de la Animoj”, de la revuo *Paco por la Jarmilo*, ambaŭ verkoj de Paiva Netto, kiuj atingis grandan reeĥon en UN.

La ĉeesto de Legio de Bona Volo tre ĝojigis la esperantistajn amikojn, kiuj nepre volis esprimi sian kontentecon revidi la amikojn de LBV, kiel S-ro **Robinson Mattos**, Ĝenerala Sekretario de la Organiza Komitato kaj membro de la Esperanto-Asocio de Rio-de-Janeiro: “Mi multfoje trovis reprezentantojn de LBV en pluraj landoj. En internaciaj kongresoj de Esperanto mi ofte trovas LBV-representantojn. Tio estas granda ĝojo por ni. Ĉi-tie ĉeestas proksimume 30 eksterlandanoj. Ni donacas al ĉiuj lecionon pri Frateco, Amo, kiel okazis en la momento pri meditado. Ĉiu reprezentanto transsendis sian mesaĝon kaj LBV partoprenis tre bone reprezentita”.

Alia amiko de LBV, instruisto de latina lingvo, tradukisto de Esperanto kaj kunlaboranto de Oomoto



Geesperantistoj vizitas budon de LBV kaj parolas kun la gejunuloj de la Instituto en Rio-de-Janeiro. Sur la unua foto, la sveda agema **Gunnar** parolas kun Aparecida Silva pri la publikigaĵo *Paco por la Jarmilo*. Sur la dua foto, je la dekstra ekstremaĵo la argentinaj, junaj **Stephanie Cabovianco** kaj **Ary Borenzweig**. Flanke, la Delegito de Universala Esperanto-Asocio, la japana **Harada Tsukuru**, kiu portis al sia lando publikigaĵojn kun mesaĝo de Paiva Netto. Sur la lasta, la portugala **Manuel Pedrosa**, kiu montras revuon, ĵus akirita de li.



de Brazilo, kiu ĉeestis en la evento, estis D-ro **Benedicto Silva**, kiu parolis pri la graveco de Esperanto por la mondo kaj pri la partopreno de Legio de Bona Volo en la Kongreso. “Mi bone konas LBV-on. La celo de Esperanto estas gravega, ĉefe rilate al Ekumenismo. Ili estas idealoj, kiuj ege helpas la Homaron, por ke ĝi elvolviĝu kaj fariĝu pli humaneca. LBV, kiel Oomoto, estas Ekumenaj movadoj, kaj la Homaro bezonas tion. Unu el la plej facilaj manieroj disvastigi tiujn idealojn estas Legio de Bona Volo. Ĉi-rilate, mi edzino estas Legianino, kaj ŝi ĉiumonate finance helpas ĝin.


*Mi dankas la oportunon kaj mi emas sendi mesaĝon al Paiva Netto — instruisto, doktoro, komponisto, poeto, filozofo. Mi emas sincere saluti lin. Mi estas amiko kaj kunlaboranto de Oomoto de Brazilo, de Profesoro **Ŝigeki Maeda**, kaj mi emas diri, ke ni tre admiras Paiva Netto, la benan laboradon, kiun li plenumas favore al la junularo, la edukadon de la gejunuloj, favore al malriĉuloj kaj favore al Ekumenismo”.*

D-ro Benedicto rememorigis ankaŭ pri la tradukaĵoj faritaj de li de la libroj *Spiritualaj Gvidlinioj de la Religio de Dio* verkita de Paiva Netto al la internacia lingvo

Esperanto: “Per tiu libroj mi povis profunde konis la grandan filozofian Spiriton de Paiva Netto, kiun mi tre admiras. Traduki la librojn kaj kelkajn tekstojn de Paiva Netto, inkluzive la poemoj, estis granda misio por mi. Ĝi ampleksigis mian horizonton, kaj havigis min la oportunon ekkoni la Spiriton de la eminenta Paiva Netto”, li konkludis.


Vizitoj de Eksterlandanoj al LBV-budo

Multe da kongresanoj vizitis la budon, kaj eksciis pri la idealo de Frateca Amo de LBV, disvastigata



“Ĉiam estas plezuro paroli kun esperantistoj kaj kun amikoj de LBV. Ni ĉiuj laboras favore al Paco por la mondo, ĉar nia idealo estas ĉefe la Paco”.

S-ro Alfredo Aragón
Prezidanto de Esperanto-Asocio de Rio-de-Janeiro (AERJ)



Ĉeestante la rekontiĝon, aliaj eksterlandaj vizitantoj ĉe la budo de LBV, inter ili, la polino Irmina Szustak (1), la argentina agema Stephanie Cabovianco (2) kaj la polino Ines Agnieszka Machota (3). La Legiana skipo (4) ankaŭ ricevas la komplimentojn de Felipe Queiroz (5), Prezidanto de BEJO.

en la tuta mondo per Esperanto. Marde, la 10-an, la skipo de Departamento pri Esperanto de LBV parolis kun esperantistaj, eksterlandaj agemaj, kiuj akiris la lanĉojn, por ilin porti al siaj landoj, celante disvastigi tian idealon de Solidereco predikata kaj travivata de la Institucio.

Felipe Duarte parolis kun la argentina esperantistino Stephanie Cabovianco por la Supera Reto Bona Volo pri Komunikado. Ŝi substrekis la esperantistan agadon, por ke Esperanto estu plie diskonigata, kaj profitis la

okazon por komenti la agadon plenumatan de LBV: “*Esperanto estas tre grava ilo por konkretigi ĉi-ĉion, kaj ankaŭ estas aliaj aferoj, kiujn oni povas fari per Esperanto. Tia idealo de Legio de Bona Volo estas tre interesa, por ke ĉio tio stariĝu: Paco, Amo, Frateco, interkompreniĝo inter la Popoloj*”.

Ĉeestante la eventon, la Direktoro de Oomoto Internacia en Brazilo, Ŝigeki Maeda, ankaŭ sendis sian mesaĝon al la Gvidanto de LBV: “*Post ĉi tiu kongreso mi vizitos la urbon San-Paŭlo por renkontiĝi*

kun Majstro Paiva Netto. Mi estis komisiita de mia Majstrino [S-ino. Kurenai Deguĉi] donaci al li ion. Por tio mi iros. Ĉiuj estraranoj kaj ĉiuj kredantoj de Oomoto iom post iom profundigas la komprenon pri LBV. Kaj eble en proksima estonteco mia Majstrino kaj Majstro Paiva Netto renkontiĝos en San-Paŭlo aŭ Brazilja. Mi volas persone, ke sinjoro Paiva Netto vizitu iam Oomoton”.


Infana Kongreseto

La partopreno de LBV sin distingis pro la lanĉoj de la infanaj

libroj, konsistantajn el la kolekto *Fabeloj de la Naturo*, de Eldonejo Elevação kun la titoloj *La mallaborema formiko* kaj *Ruĝa Fiŝeto*.

Kiel instruas la Direktoro-Prezidanto de LBV, José de Paiva Netto, oni devas eduki ne nur la Cerbon de la Homa Estulo, sed ankaŭ la Koron de lia Eterna Spirito. Tial ĉiuj infanaj libroj publikigitaj de Eldonejo Elevação prezentas gravan lecionon por la vivo, per nekomplika esprimmaniero, por ke infanoj komprenu la prezentitan mesaĝon kaj praktiku ĝin dum siaj vivoj. Tiel, post kiam ili ekkonis la historion pri *La mallaborema formiko*, la infanoj kunparolis kun la reprezentantoj de LBV pri la grava leciono prezentita de la libro. Sekve oni lotumis ses librojn al la infanoj: tri *Ruĝa Fiŝeto* kaj tri *La mallaborema formiko*.

La infanoj omaĝis la reprezentantojn de LBV kantante iun kanzonon en Esperanto. Tuj poste, la LBV-skipo instruis al ĉeestantaro la Legianan Saluton en Esperanto: *Dio Ĉeestas! Vivu Jesuo!*



João Perrotto

Oomoto omaĝas la Prezidanton de LBV per la figuro de la belega Templo Ĉoosej-den

Post honorigi la 32-an Junularan Kongreson de LBV per sia ĉeesto, la 14-an de julio en San-Paŭlo, la direktoro de la Oomoto Internacia en Brazilo, Shigeki Maeda, liveris al la gvidanto de LBV, José de Paiva Netto, belan pentraĵon kun la Templo Ĉoosej-den.

Ĉoosej-den, la Templo de Oomoto, staranta sur la piedo de la monto Hongu en sankta ĝardeno de Oomoto, Ajabe,

estis konstruita en la jaro 1992. Kun specialaj ĉambroj por la Teatro No, Konferencejo kaj tece-remonia, ĝia tuta areo konstruita atingas 5746 kvadratajn metrojn. Ĉoosej-den estis konstruita laŭ la gvido de la majstro Masao Boku, la plej granda figuro por la japantradicia arkitekturo.

Ĉoosej-den estas taksata kiel la plej granda purĉe japanarkitektura konstruaĵo en tiu ĉi jarcento.

La infanoj, kiuj partoprenis de Infana Kongreseto montras la publikigaĵojn *La mallaborema formiko* kaj *Ruĝa Fiŝeto*, de la kolekto *Fabeloj de la Naturo*. La du infanaj libroj estis preparitaj de Eldonejo Elevação speciale por la evento.



Bieno-Lernejo **Bona Espero** akceptas **Legion de Bona Volo**



La esperantista geedzo Úrsula kaj Giuseppe Grattapaglia

Enaildo Viana

La reprezentantoj de Legio de Bona Volo el Brazilja, ĉefurbo de Brazilo, vizitis je novembro 2006 la Bienon Bona Espero, en la urbo Alto Paraíso de Goiás (proksimume 250 km de Brazilja). La bieno-lernejo asistas dum la tuta periodo 25 infanojn el familio de socia risko.

En Bona Espero, la internu-
loj lernas, kultivas legomojn
kaj fruktoĝardenon, ludas kaj
praktikas sportojn. Tiujn akti-

vadojn kunordigas la germana **Úrsula** kaj la itala **Giuseppe Grattapaglia**. La esperantista geedzo, krom instrui la vastam-
pleksan kulturon de la idiomo
de Zamenhof, ankaŭ donas al
la infanoj nocio pri Ekumena
Spiritualeco.

La geedzo Grattapaglia, tre
simpatie, ricevis de la LBV-re-
prezentantoj librojn de la eldona
marko por infanoj *Bolo com Pu-
dim* (Kuko kun Pudino), de Eldo-
nejo Elevação. Sinjorino Úrsula,

siavice, petis de la instruistoj,
kiuj ili liveros la lernmaterialojn
al la gelernantoj en lernĉambroj.
Okaze de la vizito ĉeestis tie tri
gejunuloj partoprenantoj de kul-
tura interŝango. Ili estis lernantoj
de Esperanto: unu rusino, unu
germana kaj alia argentino.

La socia laborado plenumata
en la bieno estas admirinda de la
esperantistoj de la tuta mondo.
Unu evidencio rilate al tio temas
pri la ĉeesto en la domo de la pola
ĵurnalisto **Roman Dobrzyński**.

Ĉi tie situas Bona Espero:



Instruistino de Bona Espero, liveras la infanajn librojn al la gelernantoj.




La Ĵurnalisto Roman Dobrzyński

lanĉas libron en la Artgalerio de TBV

Carolina Dutra

La pola ĵurnalisto kaj kinisto Roman Dobrzyński, okaze de sia tria vizito al Brazilo, je la fino de Marto, lanĉis en la Artgalerio de la Templo de Bona Volo, en Brazilja, ĉefurbo de Brazilo, la libron *A rua Zamenhof* [Strato-Zamenhof]. En la evento ĉeestis dekoj da homoj. La libro prezentas la vivon de esperantistoj, ĉefe la persekutado kiu ili travivis okaze de la 2-a Mondmilito-periodo. Laŭ la verkisto, la libro, kiu estis tradukita el Esperanto, “prezentas tre gravan mesaĝon, per la vivsperto kaj la persekutato travivita de la nepo kaj Zamenhof-familio okaze de la 2-a Mondmilito”, klarigis la verkisto, ke tiuokaze speciale dankis: “Mi emas fini, dirante ke LBV ideale taŭgas por lanĉi tiun libron”, li asertis. Ankaŭ, la pola ĵurnalisto substrekiis, ke je la 21-a/10/1989, okaze de la inaŭguro de TBV, li intervujis la elpensinton kaj konstruinton de la Monumento, José de Paiva Netto, kaj demandis lin: “Kiel povas la Religio de Dio prediki la Senliman Ekumenismon parolante pri Jesuo?”, kaj li komplezeme respondis: “Unu el la gravaj misioj de Legio de Bona Volo estas ĝuste sensektigi Lin” (...), kaj la gvidanto de LBV daŭris prezentante la ekumenajn

karakterizaĵojn de la mesaĝo de la Dia Majstro. Ĉe la mikrofonoj de la Supera RBV, Dobrzyński diris: “Hodiaŭ ni rememoras, ke de preskaŭ 20 jaroj mi direktis gravan demandon — kio iĝis integra parto de la historio — al Frato Paiva Netto. Tio multe plaĉis min, ĉar poste mi komencis verki libron surbaze de tiu demando”. Kaj li kompletis: “Mi ne antaŭvidis, ke tio naskis tiun grandan sukceson. Plej gravas, ke la ĵurnalisto direktu la ĝustan demandon en la ĝusta momento. Tamen ne sufiĉas direkti la ĝustan demandon, oni devas demandi tion al la ĝusta homo, por ke li respondu ĝin”. Kaj li finis: “Mi nur povas diri, ke en LBV mi sentas min hejme”. La Artgalerio de la Templo de



Bona Volo estas unu el la plej grandaj kulturaj centroj de Brazilja. Konsistigas ĝian provizon verkoj de famaj verkistoj, kaj ankaŭ akceptas cirkulantajn elmontrojn. La loko ankaŭ estas libera spaco, kiu taŭgas por recitaloj, librlanĉoj kaj diversaj kulturaj eventoj.



La Templo de Bona Volo estas lokita sur SGAS 915 lotes 75/76, Brazilja/DF, Brazilo. Pliaj informoj per la telefonnumero (+55 61) 3245-1070.

Fábrica de sonhos



Rio Tóquio A mais Honda



HONDA

Novo CR-V
Liberdade é ser você mesmo



Rio Tóquio - Botafogo: Rua General Severiano, 201 / Rua da Passagem, 175 • Tel (21) 2122-4999 • fax (21) 2122-4990

Narita - Barra da Tijuca: Av. das Américas, 2001 • Tel (21) 3987-8888

Rio Tóquio - Recreio: Av. das Américas, 14.001 • Tel. (21) 2323-9000 • Fax (21) 2323-9026

www.riotokio.com.br • botafoغو@riotokio.com.br • recreio@riotokio.com.br

Rio-de-Janeiro/RJ, Brazilo